



# TEA-BULTENO


3ª JARO — NOVEMBRO 2000 — NUMERO 11



## AGENDO













| | | |
|---|---|---|
| **1** | **M** | |
| 2 | Ĵ | |
| 3 | V | La Promesita Lando (2ª parto) |
| 4 | S | |
| **5** | **D** | |
| 6 | L | |
| 7 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 8 | M | |
| 9 | Ĵ | |
| 10 | V | Kristana kaj juda versioj de islama legendo |
| 11 | S | |
| **12** | **D** | |
| 13 | L | |
| 14 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 15 | M | |
| 16 | Ĵ | |
| 17 | V | El Esperanto-Gazetaro |
| 18 | S | |
| **19** | **D** | |
| 20 | L | |
| 21 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 22 | M | |
| 23 | Ĵ | |
| 24 | V | Pri TRIESTO 2001 |
| 25 | S | Malferma Tago ĉe UEA en Roterdamo |
| **26** | **D** | |
| 27 | L | |
| 28 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 29 | M | |
| 30 | Ĵ | |

Ni ĉiam ravas, kion ni ne havas. *El Esperanta Proverbaro*

## 70ª Itala Kongreso de Esperanto

Ni atendas Vin en ***Trieste***
de la 28ª de julio ĝis la 1ª de aŭgusto 2001.

**Notindas**, ke la 2ª de aŭgusto estos dediĉita al tuttaga ekskurso: *Aquileia*, *Udine*, vizito de metiista fabriko kaj... Se vi deziras pliajn informojn, petu de TEA-sekretario la provizoran programon, aliĝilon kaj hotel-mendilon, kun listo de divers-stelaj tranoktejoj.

**Aĉeteblas** krome bildkartoj kaj glumarkoj pri la kongreso, per kiuj eblas pli efike propagandi nian nacian kongreson. Ne forgesu viziti kaj vizitigi la ret-paĝaron ĉe **http://www.esperanto.it/fei/congresso/index.html**

## Alvoko

La nombro de membraro de ITALA ESPERANTO-FEDERACIO riskas fali sub milo. Mankas trideko da aliĝoj por atingi tiun kvanton. Restante sub tiu cifero, IEF perdos (almenaŭ) unu Komitatanon «A». Tial estus oportune, ke ĉiu itala esperantisto kunlaboru por eviti tion kaj engaĝiĝu, varbante novajn anojn. Ankaŭ tiamaniere ni kontribuas al disvastigo de nia lingvo.

## El la itala gazetaro

Lettera pubblicata il 3 ottobre 2000 su IL RESTO DEL CARLINO, nella pagina LETTERE & COMMENTI.
Autore: Marco Menghini (Recanati)

**LINGUA - L'inglese? C'è già l'esperanto.**

«Ci piaccia o non ci piaccia nel mondo d'oggi l'inglese è quello che nell'antichità e nel Medioevo fu il latino» così Indro Montanelli.

Ma è giusto che alcune economie e culture forti impongano di usare una lingua affermando la cultura che esprimono a discapito delle culture degli altri? Alcune delle conseguenze sono quelle che Montanelli enuncia, fornendo consigli ad un suo lettore: «Non si dimentichi mai che gli inglesi apprezzano molto lo straniero che si adegua al loro modo di vita e ne rispetta usi e costumi... l'alien deve restare alien e farlo sentire...».

Ritengo giusto e mi piacerebbe, invece, che nei rapporti internazionali e nelle relazioni tra gli individui ognuno rimanesse sé stesso con la propria insostituibile specificità.

C'è già una lingua nata per favorire la comunicazione internazionale, l'esperanto, che potrebbe diventare la seconda lingua per tutti. Nessuno sarebbe considerato o si sentirebbe l'alien o lo scemo del villaggio globale.

## EŬROPA JARO DE LINGVOJ

**Konsilio de Eŭropo**, en kiu membras preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo kaj kiu estas konata pro sia okupiĝo pri homaj rajtoj, kaj **Eŭropa Unio** deklaris la jaron 2001, **Eŭropa Jaro de Lingvoj**.

La du eŭropaj organizaĵoj strebas progresigi instruadon de lingvoj kaj levi la konscion de la granda publiko pri la valoro de lingva plureco en Eŭropo. Krom vasta informkampanjo, uzanta specialajn simbolon kaj frapfrazojn, oni organizos amason da eventoj sur ĉiuj niveloj: tuteŭrope, plurlande, nacie kaj loke.

Uea subtenas la iniciaton de la eŭropaj organizaĵoj. La celoj de **Eŭropa Jaro de Lingvoj** kongruas kun tiuj de la Esperanto-movado, al kiu ĝi donos okazon diskonigi siajn lingvopolitikajn celojn. Eĉ se formale oni prikonsideras nur la lingvojn "rekonitajn de la membroŝtatoj", ĝi ja ebligos partoprenon ankaŭ de Esperanto-organizaĵoj per samcelaj projektoj. Krome oni povas antaŭvidi, ke ĵurnalistoj k.a. interesitoj ne limigos sin nur al la ŝtataj lingvoj sed povos interesiĝi ankaŭ pri la situacio de Esperanto kaj la perspektivoj por ĝia pli vasta uzo en Eŭropo.

La **Jaro de Lingvoj** prezentas ŝancon al agado por antaŭenigi la celojn de **Kampanjo 2000**, t.e. plialtigi la prestiĝon de la internacia lingvo, influi la internacian vivon kaj levi la organizan kaj idean nivelon de la Esperanto-movado. La **Jaro** ricevos atenton i.a. en la traktado de la kongresa temo dum la Zagreba UK, «Kulturo de dialogo - Dialogo inter kulturoj» kaj en la eldona agado de Uea.

Landaj asocioj devus ĝin atenti en siaj aranĝoj kaj eldonaĵoj, kaj klopodi kiel eble plej multe kunlabori kun neesperantistaj asocioj kaj fakuloj.

Por evoluigi ideojn pri la esperantista kontribuo al la **Jaro**, estas formiĝanta kunaganta grupo, kiun kunordigas

**Anna Ritamaki**
Dragsfjärdsvägen 690 - FI-25700 Kimito, Finnlando
tel. +358-2-423146 - fakso +358-2-423246
rete: anna.ritamaki@kolumbus.fi

Oficialaj informoj troviĝas ĉe:
http://europa.eu.int/comm/education/languages/actions/year2001.html (anglalingva kun ligoj al alipaĝaj versioj)
http://culture.coe.fr/infocentre/press/eng/2000/epress2000.04.03.html (gazetara komuniko de Konsilio de Eŭropo).

## ... kaj plue pri Eŭropa Jaro de Lingvoj

*El Germanio informas Ulrich Matthias*
*Ulrich.Matthias@t-online.de*

En la kalendaro pri germanaj eventoj, ĉe http://www.nabibb.de/ejs/ oni anoncas inter la unuaj 20 enlandaj **Ejl**-aktivaĵoj du Esperanto-aranĝojn: la Printempan Semajnon Internacian en Andreasberg (kun temo: «Eŭropo sen lingvaj limoj?»; dato: 09-16.04.2001) kaj la Germanan Esperanto-Kongreson («La Eŭropa Jaro de la Lingvoj», 01-04.06.2001) en Ludwigshafen. La **Psi**-organizantoj petis de Eŭropa Unio specialan subvencion okaze de la Eŭropa Jaro de Lingvoj.

Sur la retpaĝo http://www.stol.it/Hp/Sub/Ger/Service/Tagung/Tagung-2751.asp estas informo, en germana lingvo, ke lundo, la $23^a$ de aprilo 2001 estos la «Eŭropa Tago de Lingvoj». Certe tiu tago ofertos bonan okazon por atentigi la amaskomunikilojn pri Esperanto.

Sur la retpaĝo http://home.t-online.de/home/Ulrich.Matthias/ejl.htm, la informinto aperigis sufiĉe ampleksan germanlingvan artikolon pri tio, kion esperantistoj havas por diri okaze de **Ejl**. La artikolo konsistas ĉefe el interesaj citaĵoj, trovitaj i.a. per retaj serĉprogramoj. Krome ĝi pritraktas i.a. la celojn de **Ejl** («Lingvoj kiel fonto de vivoĝojo», «Lingva plureco» - sen egalrajteco?) kaj pri lingvaj baroj en ekonomio, scienco, turismo, internaciaj organizoj, eklezio, kulturo ktp.

## Fame-Premio

En solena matineo en la urba biblioteko, la **Fame**-fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj transdonis la $7^{an}$ Esperanto-Kulturpremion de Aalen al William Auld, unu el la plej gravaj kreantoj de Esperanto-kulturo en nia epoko.

Bedaŭrinde lia sanstato ne permesis al la honorato persone fari la longan vojaĝon de Skotlando al Suda Germanujo. En lia nomo la premion, konsistantan el 10000 germanaj markoj (ankoraŭ markoj, ne eŭroj), transprenis Michael Scherm, prezidanto de la germana **Ilei**-sekcio, kiu sprite dankis en la nomo de Auld, citante, Esperante kaj germanlingve, tradukon el **Retoriko** de Ivo Lapenna.

La laŭdacion digne faris d-ro Werner Bormann, prezidanto de la **Fame**-fondaĵo, antaŭa prezidanto de la Akademio de Esperanto, kiu mem, simile al la premiito, okupis multajn poziciojn en nia movado, tiel montrante kombinon de intelekta laboro kaj tute konkretaj organizaj taskoj.

En germana lingvo, por la ĉeestantaj reprezentantoj de la publika vivo - urbo, gimnazio, distrikta banko kaj aliaj - li skizis la diversajn facetojn de la verko de William Auld. El la posedo de la **Germana Esperanto-Biblioteko**, kies sidejo troviĝas en la sama domo de la urba biblioteko de Aalen, estis elmontritaj la plej gravaj el la libroj de la skota majstro (poezio, tradukoj, instrua materialo, eseoj). La reprezentanto de la urbo montris sin impresita pri la vivo-verko, ja ankoraŭ ne finita, de persono, kiun gravaj homoj el la monda kultura vivo trovis inda, pasintjare, esti kandidato por la literatura Nobel-premio, kio en si mem vekis grandan atenton ne nur en la skota gazetaro.

La nobel-premion ricevis Guenter Grass. Sed la esperantistoj fieras pri sia propra grava distingo, la **Fame**-kulturpremio, kaj ili fieras pri Bill Auld.

*Informis Karl Heinz Schaeffer - Aalen/Germanujo*

## *1000-jaraj lokoj mondvaste serĉataj!*

Kiu miljariĝas? Jen bona okazo por kune festi internacie! La mezepoka bavara urbo Kronach jubilee festos dum 2000-2003 sian miljaran ekziston. Okaze de tiu unika evento, la lokaj Esperanto-grupanoj intencas diskonigi sian urbon, kaj serĉas kontaktojn kun urb(et)oj, kiuj en 2003 pruveble samjariĝos. Ni alvokas ĉiujn esperantistojn esplori la aĝon de propra hejmurbo, ĉu ĝi estas miljara aŭ eble eĉ pli. Se jes, bonvolu sendi (bild)karton pri via urbo kaj kopion de iu historia dokumento, kiu pruvas la realan aĝon al: **Gosbert Gehlert**, **Belo**-Prezidanto

retpoŝte: belo@bavara-esperanto-ligo.de
Am Kehlgraben 61, D-96317 Kronach - Germanio.

## El Popola Ĉinio ĉesos aperi en presita formo

Ĉi tiu malbela novaĵo aperis tre frue ĉe la reto, novaĵo pri kiu eĉ oni ekhavis dubojn pri vereco: ĉu eblas, ke ĝuste nun, post tiel pompa festado pri ties 50-jariĝo, oni decidu ĝin ne plu eldoni en papera versio? Bedaŭrinde ne temis pri misinformado, ĉar plenan konfirmon donis la preskaŭ tutpaĝa anonco en la pasintmonata ekzemplero de tiu belega revuo. Ni ne povas resti indiferentaj antaŭ ĝia bedaŭrinda malapero: do, ni sekvu la inviton de **Renato Corsetti**, vicprezidanto de UEA, kiu sugestas, kiamaniere efike kaj inteligente reagi.

## Pledo por plueldono de presita
### EL POPOLA ĈINIO

En la oktobra numero de la konata revuo El Popola Ĉinio estas anonco pri la ĉesigo de ĝia eldonado en la ĝisnuna papera formo. Estonte la revuo aperos nur en la elektronika reto, kie ĝi estos senpage rigardebla.

Ĉar dum 50 jaroj EPĈ fariĝis tre konata kaj ŝatata inter esperantistoj, mi petas ĉiujn abonantojn kaj ŝatantojn de tiu revuo, ke ili bonvolu skribi al la ĉina ambasadejo en sia lando por esprimi sian bedaŭron kaj sian deziron plu ricevi la revuon ankaŭ en la nuna formo.

La letero estu pozitive vortumita, tio estas: ĝi emfazu la altan kvaliton de la revuo, ĝian utilecon por ekkoni Ĉinujon kaj ĉinajn problemojn. kaj la ĝeneralan ŝaton de ĝi fare de la legantoj, ktp. Fine de la letero oni esprimu la deziron, ke la kompetenta registara instanco repripensu la decidon kaj ebligu pluan aperon de la papera versio de El Popola Ĉinio. Mi ankaŭ instigas ĉiujn, kiuj havas tiun eblecon, regule mem legi kaj diskonigi al aliaj la retan version de EPĈ ĉe www.ĉina.org.cn por montri ankaŭ tiel la popularecon de la revuo inter esperantistoj.

Dankon pro la kunlaboro *Renato Corsetti*

## Mallongete pri...

### En 2003 la UK en Gotenburgo

Dum la fina ceremonio de la Universala Kongreso de Tel-Avivo la estraro de UEA informis, ke ĝi decidis akcepti la inviton de Sveda Esperanto-Federacio, ke la UK en la jaro 2003 okazu en Gotenburgo, la dua urbo de la lando. Ĝi estos la kvara UK en Svedio: 1934 – Stokholm; 1948 – Malmö; 1980 – denove Stokholm. La kongreso okazos ene de la urbo mem inter la 26a de julio kaj la 2a de aŭgusto. Pro tio ke la UK la jaron antaŭe okazos ekstereŭrope, en Brazilo, oni atendas inter 2500 kaj 3000 kongresanojn. La organizantoj jam nun intense laboras.

### Esperantlingva, la retejo de Roccastrada (GR)

Kunlabore kun ges-roj Vittorio kaj Luisa Madella (Parma), la Komunumo de Roccastrada realigis sian TTT-paĝaron ankaŭ en Esperanto. Bv. ĝin legi ĉe:

http://www.ciaotoscana.com/cultura/esperant/start.htm

*El Nova Sento*

### Ankaŭ Nova Espero Friuli en Interreto

Kiu deziras viziti ĝin, iru al http://www.dlfudine.it ⇒ Cultura ⇒ Esperanto. La koncernaj prizorgantoj atendas viajn kritikojn, komentojn, sugestojn kaj … kial ne? vian helpon por plibonigi la paĝon kaj prezenti nian aferon kiel eble plej alloge kaj inde al la neesperantistaj interretanoj.


### Osiek-Premio 2000

La membroj de Osiek - Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj - kunvenis fine de julio en Motovun, Kroatio, kaj per sekreta voĉdonado atribuis la ĉijaran premion al

**TREVOR STEELE**

pro originala verko: **FALANTAJ MUROJ**

La premio (= 400 eŭroj) rekompencas vivantan aŭtoron pro publikigita verkaĵo ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro.




## Masonistoj serĉataj

Konstrua firmao inter Bazelo kaj Strasburgo (Alzaco) dungas masonistojn (lingvo: itala aŭ esperanto). Long-daŭra kontrakto, aŭ nur kelkajn monatojn laŭ deziro. Ni ŝatus ankaŭ malfermi filion en Italio: ĉu faka konstruisto estus interesita por fondi komunan firmaon en Italio (prefere: Nord-orienta)?

Interesatoj sin turnu al

BASSO Michel - Rue de Tiefenbach
FR-68920 WINTZENHEIM-COLMAR
100623.3022@compuserve.com

Konstru-firmao CL. Bâtiment serĉas kapablajn masonistojn el Eŭropa Unio, parolantajn Esperanton, la francan aŭ italan. Informpetoj al CL. Bâtiment (ĉe supra adreso).



### *Kroata Poŝto eldonos Esperantan poŝtmarkon*

La 86a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Zagrebo, ricevos sian poŝtmarkon, kiu estos unu el 19 eldonotaj de la Kroata Poŝto en la jaro 2001. En 1997, honore al la 1a kongreso de kroataj esperantistoj, estis eldonita poŝtmarko, kun la bildo de nia Majstro, en 300.000 ekzempleroj.

## Texel-insulanoj ekzemplis!

Denova inaŭguro de restaŭrita Esperanto-monumento en Nederlando: ĉi-foje temas pri monumento, farita de Mario Santuz, en la suda urbo Bergen op Zoom; tie, en 1933, ĝi estis inaŭgurita de Lidja Zamenhof.

Dum la lastaj jardekoj ĝi suferis pro iom-post-iomaj damaĝoj, tiel ke, laŭ instigo kaj kun financa helpo de Esperanto Nederland, la urbestraro de Bergen op Zoom decidis funde restaŭrigi ĝin.

La 9an de septembro 2000 inaŭgure parolis d-ro Louis Zaleski-Zamenhof, en ĉeesto de Mario Santuz, funkciuloj de la Komunumo, estraranoj de Esperanto Nederland kaj la ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller. Okazis ankaŭ muzika prezentado de la grupo Akordo kaj la kantĥoro Malvo.

Esperantistoj esprimu sian simpation pri la restaŭro de la monumento per letero aŭ poŝtkarto al la Komunumestraro: Postbus 35, NL-4600 AA Bergen op Zoom, per fakso: +31 164 245356 kaj ankaŭ al la regiona gazeto **BN DeStem**, rete: redactie@bndestem.nl

# Pli ol 60 milionoj subskribis Manifeston 2000

La subskribokampanjo de UNESKO por **MANIFESTO 2000**, iniciatita de grupo de Nobel-premiitoj pri paco kadre de la Internacia Jaro por la Kulturo de Paco, jam pli ol duonvojas. El la celataj 100 milionoj da nomoj pli ol 60 milionoj estis atingitaj en septembro. Duono el ili, iom pli ol 30 milionoj, estis kolektita en Hinda Unio, dum en Brazilo oni superis 13 milionojn.

Ekde la komenco ankaŭ UEA partoprenas en la kampanjo. Ĝi eldonis la Esperantan tradukon de la MANIFESTO kiel belan faldfolion. Multaj gazetoj aperigis tiun tekston kun kupono por subskribo, dum eblas ankoraŭ subskribi en Interreto ĉe www.uea.org/2000.html. Ĝis la 10ª de oktobro UEA ricevis entute 5669 subskribojn, el kiuj 4152 papere kaj 1517 rete. El 82 landoj Brazilo estas la sola kun pli ol mil subskriboj (1027), sekvata de Italio (853) kaj Francio (633). La statistiko malkaŝas ankaŭ, ke en multaj landoj kun relative forta Esperanto-movado oni ankoraŭ neglektis la kolektadon. Landaj asocioj kaj lokaj kluboj devus rapide ekaktiviĝi, sed iniciatemaj esperantistoj kompreneble ne bezonas atendi ilian instigon por mem ekagi.

Interese estas, ke inter ĉiuj neregistaraj organizaĵoj UEA troviĝas je la 14ª loko en la monda statistiko de kolektantoj de subskriboj por **MANIFESTO 2000**. Duono de tiuj estis kolektita de Monda Spirita Universitato Brahma Kumaris. Pli ol unu milionon atingis ankaŭ Monda Federacio de Unesko-Kluboj, -Centroj kaj -Asocioj. La 20 plej aktivaj NRO-j laŭ la nombro de kolektitaj subskriboj jenas:

| | |
|---|---|
| 30 588 855 | Monda Spirita Universitato Brahma Kumaris |
| 1 101 481 | Monda Federacio de Unesko–kluboj, –Centroj kaj –Asocioj |
| 247 365 | Studrondo Guru Gobind Singh |
| 102 168 | Jubillenium |
| 90 014 | Monda Konfederacio de Instruistoj |
| 70 026 | Fondaĵo Dhammakaya |
| 66 816 | Pax Christi Internacia |
| 35 109 | Caritas Internationalis |
| 30 000 | Soka Gakkai Internacia |
| 13 399 | Monda Packonsilio |
| 11 622 | Pacboato |
| 9 578 | Soroptimista Internacio |
| 9 216 | Fondaĵo Alvoko de Nobel-Premiitoj |
| **5 669** | **Universala Esperanto-Asocio** |
| 4 769 | Kunordiga Komitato de Internacia Volontula Servo |
| 3 243 | Kunularo de Aktivuloj por Homara Bonfarto |
| 2 707 | Monda Organizaĵo por Antaŭlerneja Edukado |
| 2 586 | Monda Skolta Asocio |
| 1 629 | Pacfondaĵo Goi |
| 1 522 | Internacia Konsilio de Organizaĵoj de Folkloraj Festivaloj kaj Popola Arto |

La kolektado de subskriboj plu daŭras.
Oni povas subskribi en Interreto ĉe **www.uea.org/2000.html** aŭ per letero al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

## FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA
### COMMISSIONE SCUOLA E GRUPPO DI ROMA

Lingva seminario por komencantoj, komencintoj kaj fluuloj - ESPERANTO: NENIU ESTAS PERFEKTA

Se vi estas esperantisto ĵus bakita aŭ tre sperta, vi tamen ŝatas renkonti aliajn homojn, kiuj parolas Esperanton, plulerni Esperanton aŭ simple plupraktiki ĝin dum kelkaj tagoj. Se, krome, vi estas instruisto pri Esperanto, vi certe ŝatas renkonti aliajn instruistojn kaj ĝisdatiĝi pri instrumetodoj kaj instruiloj. Ĉion tian vi povas fari en la kutima aŭtuna seminario de la italaj esperantistoj, kiu ĉi-jare estas aranĝata en centra Italujo, en tre komforta ejo kaj en tre plaĉa ĉirkaŭaĵo. En la Programo: lingvaj ludoj, ekzercoj pri samtempa tradukado, prezento de modellecionoj, de instruiloj... Ne mankos distraĵoj kaj kulturaĵoj.

Praktikaj informoj ➔ Loko: Frascati - Centro Giovanni XXIII, Via Colle Pizzuto, 2 - 00044 Frascati; Dato: de la 8ª de decembro 2000ª, posttagmeze, ĝis la 10ª tagmeze; Kostoj: aliĝ-kotizo kaj restado dum la tuta seminario ➔ L.190.000; nur aliĝo al la seminario ➔ L. 20.000; aldona pago por unulita ĉambro, por ĉiu nokto, ➔ L. 25.000; unu manĝo ➔ L. 25.000.

Antaŭmendu ĉe: Michela Lipari - Viale Giulio Cesare, 223 - 00192 Roma; tel. 06-39726198; fax. 06-39726169; <mc8750@mclink.it>

Kaj antaŭpagu (L. 50.000) al Associazione Esperanto-Centro LUIGI MINNAJA ĉe Caselli Marcello - Via Nomentana, 352 - 00141 Roma, poŝta konto n° 70903000.



## Esperanto pontas en Teo-Festivalo

De la 18ª ĝis la 21ª de majo 2001, en fama teo-hejmloko Xinyang, Ĉinio, okazos la 10ª Xinyang-a Teo-Festivalo, organizata de la urba registaro.

Dum la festivalo oni aranĝos negocan ekspozicion, artajn programojn, ekskursojn ktp. Sekve de la propono de s-ro Zhang Xuesong, la organizanto decidas prezenti mondan teokulturon dum la festivalo, inkluzive de teoceremonio, diverslokaj moroj de teumado ktp. Esperanto funkcios kiel ponto en la aranĝo.

Samtempe okazos ankaŭ la SIMPOZIO DE ESPERANTO-KOMERCA KUNLABORO, kadre de kio esperantistoj, komercistoj kaj ekonomiistoj estas ege bonvenaj.

Pliaj informoj, aliĝiloj kaj invitiloj peteblas antaŭ la 20ª de aprilo 2001, ĉe s-ro Zhang Xuesong, Changtaiguan Dianguansuo, CN-464193 Xinyang, Henan, Ĉinio. Tel.: +86-376-8821553; Retadresoj: 1. deodaro@263.net 2. hnxychyj@public.lyptt.ha.cn

---

Plejparto de la informoj fontas el RET-INFO.

BULTENO de la membroj de
Triesta Esperanto-Asocio
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@tiscalinet.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349